



Nitobe-Simpozio “Lingvo, Konflikto, kaj Sekureco”

PROGRAMO

Bonvolu noti: ĉiuj horoj estas laŭ la loka horo: BST (Brita Somera Tempo, Belfast / London: UTC+1)

Organizantoj: la Universitato de Ulstero kaj la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED)

Moderigantoj: *Michele Gazzola, Angela Tellier, Mark Fettes, Humphrey Tonkin*

Ni kun dankoj agnoskas la finacan subtenon de **Esperantic Studies Foundation** (ESF).

La laborlingvoj de la evento estos la angla kaj Esperanto.

Ni okazigos samtempan interpretadon.

Interpretistoj: *Duncan Charters kaj István Ertl*

De 1996 la Nitobe-Simpozioj kunvenigas diversajn spertulojn kaj aliajn koncernatojn, por ke ili preparolu aktualaĵojn de lingvopolitiko en internaciaj kunteksto. La serion oni nomis laŭ la japana internaciisto kaj diplomato Nitobe Inazō, kiu oficis kiel ĝenerala vicsekretario frue en la historio de la Ligo de Nacioj, kiam ĝi komencis studi lingvopolitikon eksplicite kaj je la internacia nivelo.

La Simpoziojn organizas la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo kunlabore kun diversaj lokaj partneroj kaj subvenciate de Esperantic Studies Foundation. Ĉi-jare ni ĝojas pro nia partnereco kun la Fako pri Aplikataj Sociaj kaj Politikaj Sciencoj ĉe la Universitato de Ulstero por esplori temon tre gravan en la kunteksto nord-irlanda, eŭropa kaj internacia: “Lingvoj, konfliktoj kaj sekureco”.

Kiam ajn rolas en konflikto lingvopolitiko, ĝi implikiĝas en reto de aliaj temoj, ekzemple etna kaj rasa identecoj, religio, rajtoj je tereno kaj proprietaĵo, kaj partoprenado en demokratio. Tamen, oni ofte subtaksas la lingvan flankon kaj ankaŭ la malfacilon de kompromisoj justaj kaj daŭripovaj per lingvaj aktoj kaj politikoj. La elstaraj kontribuantoj al la ĉi-jara simpozio certe iluminos pli hela ĉi tiun nemalhaveblan flankon de konflikto-solvado kaj packonstruado. Nome de la organizantoj, mi volas elkore danki niajn kontribuantojn. Mi esperas, ke ĉiu gajnos de sia sperto.

Mark Fettes

Direktoro, Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo

LUNDO, 26-a de JULIO 2021 ~ 12:30 (Belfasta / Londona horo)

Bonveniga prelego – Prof. Paul Carmichael, Vicdekano pri Tutmonda Engaĝado en la Fakultato de Arto, Humanistiko, kaj Sociaj Sciencoj ĉe la Universitato de Ulstero

Bonvenigo kaj enkonduko al la tago – Michele Gazzola (Universitato de Ulstero)

Enkonduko al CED, ESF kaj la Nitobe-Simpozio – Humphrey Tonkin (Universitato de Hartford)

SEKCIO 1 ~ 13:00 – 15:45

Lingvopolitiko en Nord-Irlando kaj la sekvoj por la dividado de la povo en konfliktantaj socioj

(1) **Sarah Williams** (Direktoro pri Regado kaj Konformiĝo, Belfasta Urba Konsilio) ~ 30 minutoj *La lingva strategio de la Urba Konsilio de Belfasto 2018-2023.*

(2) **Philip McDermott** (Universitato de Ulstero) ~ 20 minutoj
Lingva agnoskado kaj profunde dividitaj socioj: ĉu de tolerado al diskuto?

Sekcio 1a ~ Demandoj kaj respondoj ~ 15 minutoj

Paŭzo ~ 15 minutoj

(3) **Janice Carruthers** kaj **Mícheál Ó Mainnín** (Reĝina Universitato de Belfasto) ~ 20 minutoj
Lingvopolitiko en Nord-Irlando post la interkonsento 'Nova Jardeko, Nova Aliro'.

(4) **Niall Comer** (Universitato de Ulstero) ~ 20 minutoj
Pretigado de la vojo al prilingvaj aktoj: la irlanda ligo, la Universitato de Ulstero kaj la interkonsento 'Nova Jardeko, Nova Aliro'.

(5) **Raffaella Folli, Juliana Gerard, Lynda Kennedy, Susan Logue kaj Christina Sevdali** (Universitato de Ulstero) ~ 20 minutoj
Rikolto de plurlingvaj enmigrintaj lernantoj: dek jaroj en la Centro pri Plurlingveco ĉe Ulstero.

Sekcio 1b ~ Demandoj kaj respondoj ~ 25 minutoj

SEKCIO 2 ~ 16:00 – 17:30

Lingvo en humanecaj krizoj kaj anticipa packonstruado mondscale

(1) **Carmen Delgado Luchner** (Universitato de Friburgo) ~ 30 minutoj
Kiel plani por la neantaŭvidebla: regado de lingvaj ligantoj en humanecaj organizaĵoj.

(2) **Javier Alcalde** (Aŭtonoma Universitato de Barcelonao; Malfermita Universitato de Katalunio) ~ 20 minutoj
Paco kaj lingva diverseco. Kiu rolo por Esperanto?

Sekcio 2 ~ Demandoj kaj respondoj ~ 15 minutoj

Finaj rimarkoj ~ FINO DE LA UNUA TAGO

MARDO, 27-a de JULIO 2021 ~ 12.30 (Belfasta / Londona horo)

Bonvenigo kaj enkonduko al la tago – **Angela Tellier** (Universitato de Essex)

Akademias publikaj de CED – **Michele Gazzola** (Universitato de Ulstero)

SEKCIO 3 ~ 12:45 – 15.35

Lingvo kadre de sekureco kaj konfliktoŝolvido en Eŭropo

(1) **Alessandro Rotta** (Organizaĵo por Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo) ~ 30 minutoj

Lingvaj politikoj por preventi konfliktojn: la sperto de la Alta Komisararo pri Naciaj Minoritatoj.

(2) **Roberta Medda-Windischer** (Instituto pri la Rajtoj de Minoritatoj, Eurac Research) and **Sia Spiliopoulou Åkermark** (Pacstituto de Alando) ~ 20 minutoj

Indikiloj de lingva integrado por atingi lingvan justecon: Taksado de la plenumado de politikoj bazitaj sur la Gvidlinioj Ljubljano per indikiloj.

(3) **Sarah McMonagle** (Universitato de Hamburgo) ~ 20 minutoj

Lingvopolitiko en multlingvaj urboj.

Sekcio 3a ~ Demandoj kaj respondoj ~ 25 minutoj

Paŭzo ~ 15 minutoj

(4) **Sonja Novak Lukanoviĉ** (Universitato de Ljubljano) ~ 20 minutoj

Ĉu lingva konflikto markas lingvan kontakton en Slovenio?

(5) **Ljubica Djordjeviĉ** (Eŭropa Centro pri Minoritataj Temoj) ~ 20 minutoj

Lingva naciismo: la statuso de lingvoj kaj tiel-nomataj lingvoj, kiuj aperis el la serbokroata.

Sekcio 3b ~ Demandoj kaj respondoj ~ 25 minutoj

SEKCIO 4 ~ 15.50 – 17:30

Antaŭenpuŝi lingvan justecon

(1) **Irmgarda Kasinskaite-Buddeberg** (Unesko) ~ 30 minutoj

La internacia jardeko pri Indiĝenaj Lingvoj (2022-2032) kiel unu el la internaciaj kunlabor-meĥanismoj cele al lingva justeco.

(2) **Michele Gazzola** (Universitato de Ulstero) kaj **Mark Fettes** (Universitato Simon Fraser) ~ 30 minutoj

Indekso pri lingva justeco kiel ilo por preventi konflikton.

Sekcio 4 ~ Demandoj kaj respondoj ~ 15 minutoj

Finaj rimarkoj ~ FINO DE LA NITOBESIMPOZIO
RESUMOJ ~ UNUA TAGO

S-rino Sarah Williams ~ Direktoro pri Regado kaj Konformiĝo, Belfasta Urba Konsilio

Ĉi tiu prelego prezentos la aliron de la Belfasta Urba Konsilio al la disvolvo kaj realigo de nova Lingva Strategio por la urbo. Ĝi inkluzivos la fonon de la Lingva Strategio, resumon de la Strategio kaj ĝiaj celoj, la laboron ĝis nun faritan, kaj la venontajn paŝojn en la plua evoluigo de la Strategio.

D-ro Philip McDermott ~ Supera Docento pri sociologio, Universitato de Ulstero

Ĉi tiu prelego konsideros kelkajn defiojn fronte al la aplikado de lingvaj rajtoj en profunde dividitaj socioj. Mi argumentas, ke por apliki ĉi tiujn rajtojn oni devas preterpasi nur simplan kompromisadon por alveni al integrita dialogo inter malsamaj lingvaj komunumoj.

Prof. Janice Carruthers ~ Asociita profesoro pri franca lingvistiko, Reĝina Universitato de Belfasto

Prof. Mícheál Ó Mainín ~ Profesoro pri la irlanda, Reĝina Universitato de Belfasto

Ĉi tiu prelego konsideros la staton de lingvoj en la kreado de politikoj en Nord-Irlando post *Nova Jardeko*, *Nova Aliro*. Ĝi inkluzivos la kulturajn kampojn de la irlanda kaj ulsterskota, komunuman koherecon (ankaŭ en komunumoj de la tielnomataj “novalvenintoj”), ekonomian renovigon (per internacia komerco, turismo, k.a.) kaj edukadon (pri kulturaj kaj soci-ekonomiaj defioj).

D-ro Niall Comer ~ Docento pri la irlanda, Universitato de Ulstero (Esplorfako: Modernaj Lingvoj kaj Lingvoscienco); prezidanto de Conradh na Gaeilge

La leĝaj postuloj de la interkonsento *Nova Jardeko*, *Nova Aliro* pri la irlanda lingvo rezultis el daŭra, komunuma kampanjo, kiun apogis esplorado de *Conradh na Gaeilge* kaj la Universitato Ulster. La parlamenta estro de Nord-Irlando kaj la Irlanda Registaro agnoskis la gravecon de ĉi tiu kontribuo. Ĉi tiu prelego traktos la procedon kiu kondukis al la leĝaj postuloj de la interkonsento.

Prof. Raffaella Folli ~ Fakultato pri Komunikado kaj Amaskomunikiloj, Universitato de Ulstero; provosto de la kampuso Belfasto/Jordanstown

D-ino Juliana Gerard ~ Docento, Fakultato pri Komunikado kaj Amaskomunikiloj, Universitato de Ulstero

D-ino Lynda Kennedy ~ Docento pri parola kaj lingva terapio, Fakultato pri Sansciencoj, Universitato de Ulstero

S-rino Susan Logue ~ Esplorasistanto pri Language made fun, Fakultato pri Komunikado kaj Amaskomunikiloj, Universitato de Ulstero

D-ino Christina Sevdali ~ Supera Docento, Fakultato pri Komunikado kaj Amaskomunikiloj, Universitato de Ulstero

En la Nord-Irlanda kunteksto, “novalveninta lernanto” signifas enmigrintan infanon, kies denaska lingvo estas nek la angla nek la irlanda. La Centro pri Multlingveco ĉe la Universitato Ulster celas sintezi la fakan esploron pri multlingveco por komuniki ĝin al gepatroj, instruistoj, parolterapiistoj kaj politikistoj. Dum la lastaj dek jaroj, la centro kunlaboris kun novalvenintoj per du interrilataj projektoj: Language Made Fun kaj Language Together, kunlabore kun la lernejoj Barnardo’s, Fane Street kaj Holy Rosary. En ĉi tiu prelego ni prezentos la ĉefajn rezultojn de nia esplorado kun siriaj, sudanaj kaj romaaj novalvenintaj infanoj kaj familioj, la akiradon de tri lingvoj (vd. Devlin k.a., 2015 kaj ankaŭ sekvajn), kaj la efikon de aĝo al la akirado de pluraj lingvoj (vd. Logue k.a., 2020 kaj ankaŭ sekvajn).

Ni montras, ke la nuna politiko ‘Ĉiu lernejo estu bona lernejo: subteno al novalvenintaj lernantoj’, kiu celas pli da sociaj kohereco kaj integriĝo, povas pliboniĝi per konsiderado de la jenaj rezultoj: 1. La koncepto “novalveninto” estas utila nur se ĝi ne kaŝas la efektivan spektron de multlingvaj lernantoj, kiuj havas variajn lingvaj kaj edukajn bezonojn. 2. Diversaj grupoj varias laŭ sia preteco socie asimiliĝi kaj interagi kun oficiala instruado depende de la kultura kaj lingva fonoj. 3. Multaj defioj, kiujn alfrontas multlingvanoj mergate en nova lingva medio, ligiĝas al la trajtoj de la denaska lingvo. Ĉi tiuj trajtoj oni povas utiligi frue en la integriĝado de la lernanto al la lernejo. 4. Por integriĝi en la socio, novalvenintaj infanoj ne devas forlasi sian hejman lingvan identecon. Oni spronu ilin al uzado de la hejma lingvo ankaŭ en la lerneja kunteksto. 5. Novalvenintaj infanoj povas per lud-bazitaj, eksterlernejaj aktivajoj riĉigi sian lingvan kapablon. Ĉi tio povas akceli integriĝon per moderigo de la lingvaj baroj.

D-ino Carmen Delgado Luchner ~ Direktoro de la Lingvocentro de la Universitato de Friburgo (Svislando);
Esplorasociito, Universitato de Liberŝtato (Sud-Afriko)

Surbaze de esploradoj en la Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco (ICRC) kaj krome en la Alta Komisaro de Unuiĝintaj Nacioj pri Rifuĝintoj (UNHCR), ĉi tiu prelego traktos la strukturajn defiojn spertatajn de humanecaj organizaĵoj en la elektado, varbado kaj sendado de interpretistoj. Apartan emfazon ricevos la humaneca principo pri neŭtraleco kaj ĝia efiko al dungado por malprioritigi fakan scion, inkluzive lingvajn lertecojn. Mi priparolos la lingvan flankon de humaneca laboro fone de la pli larĝa, aktuala debato pri la roloj de nelokaj kaj lokaj humanecaj helpantoj.

D-ro Javier Alcalde ~ Docento pri politika scienco en la Aŭtonoma Universitato de Barcelono kaj la Malfermita Universitato de Katalunio

Kvankam paco kaj lingva diverseco ŝajnas nature ligitaj, la kaŭzon oni apenaŭ mencias. Kial ni devas konservi lingvan diversecon por atingi mondan pacon? Mi argumentas, ke demokratio estas maniero por trovi mankantan elementon. Unue, laŭ la teorio de demokrata paco, ekzistas plurdimensia rilato inter paco kaj demokratio; nome, se ĉiuj landoj demokratiigus, monda paco sekvus. Alivorte, monda paco bezonas tutmondan demokration.

Due, la ĉefaj principoj de demokratio inkluzivas defendon de la rajtoj de minoritatoj (kaj ankaŭ la defendon de iliaj lingvoj) kaj la egalan partoprenadon de ĉiuj civitanoj (normale per lingvo parolata de plimulto). La nuna fakliteraturo pri lingva justeco traktas la demokratian manieron por atingi ĉi tiujn deziratajn trajtojn en multlingvaj politikaj unuoj je diversaj niveloj (lokaj, naciaj, internaciaj, ktp). Normale oni konsideras tion kompromiso, kvankam estas eble atingi ambaŭ celojn (kaj egalecon kun efiko kaj identecon kun komunikado) per internacia lingvo. La lasta parto de mia prelego respondos al la sekva demando: Kiu lingvo plej taŭgas por ĉi tiu rolo, nepra por lingva diverseco kaj tial ankaŭ nepra por paco?

RESUMOJ ~ DUA TAGO

S-ro Alessandro Rotta ~ Supera konsilanto al la Organizaĵo por Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo (OSCE), Alta Komisararo pri Naciaj Minoritatoj

Ĉi tiu prelego uzos kiel sian materialon pli ol dudek jarojn da formado de lingvaj politikoj fare de la Alta Komisararo pri Naciaj Minoritatoj (HCNM) por eviti konfliktojn kaj integri diversajn sociojn. Deirante de la Oslo-Rekomendoj pri la lingvaj rajtoj de naciaj minoritatoj kaj analizante la plej bonajn praktikojn fiksitajn dum la jaroj, mi resumos la kondiĉojn de firma lingvopolitiko. Mi preparolos la bezonon je ekvilibro inter efika multlingvismo kaj la informado kaj uzado de oficialaj kaj unuigaj lingvoj. Ĉi tiu kontribuo substrekos la gravecon de ekvilibra lingvopolitiko en la regado de diversaj socioj.

D-ino Roberta Medda-Windischer ~ Supera esploristo, ĉefo de esplorgrupo, Instituto pri la Rajtoj de Minoritatoj, Eurac Research (Bolzano/Bozen, Italujo)

D-ino Sia Spiliopoulou Åkermark ~ Asociita profesoro pri internacia juro, direktoro de la Pacinstituto de Alando (Mariehamn, Finnlando)

Ĉu ekzistas indicoj pri integriro en Eŭropo, kiuj kaptas la spertojn de minoritatoj? Ĉi tiu prelego prezentos la rezultojn de lastatempa mapado de integrig-indicoj en la OSCE-areo kuntekste de la Gvidlinioj Ljubljano pri la Integrigado de Diversaj Socioj (aprobata de la HCNM en 2012). Kiel oni difinas diversecon en ĉi tiuj indicoj? Kiel oni kombinas kaj kvalitajn kaj kvantajn elementojn, kaj kiel stas minoritataj lingvoj?

D-ino Sarah McMonagle ~ Esplorasociito, Fakultato pri Edukado, Universitato de Hamburgo, Germanujo

Urboj estas lokoj, kie kulminas lingva diverseco. Kvankam municipaj registaroj ekzistas sub la regado de naciaj registaroj, urba lingvopolitiko estas interesa kaj studinda fenomeno. Unue, urboj servas la publikon per municipaj servoj ĉiutage. Tial, ili devas decidi eksplicite kiel (ne) respondi al diversa publiko. Ĉi tiuj decidoj povas aŭ eksciti aŭ mildigi konfliktojn. Due, urboj povas superi la striktecon de naciaj politikoj. Trie, dum daŭras enmigrado kaj urbiĝo, urboj ankoraŭ prezentas la multlingvan estontecon. Depende de siaj respondoj, urboj povas prezenti modelon de integriro, inkluzivado kaj partoprenigo, kiuj kondukas nin al paca kunvivado. Same, ili povas prezenti la malon.

Prof. Sonja Novak Lukanovič ~ Instituto por Etnaj Studoj kaj Fakoj pri Kompara kaj Ĝenerala Lingvoscienco de la Fakultato pri Artoj, Universitato de Ljubljano

Ĉi tiu prelego prezentos la specon de lingva kontakto, kiu ekzistas en Slovenio kaj montros la eksterajn faktorojn, kiuj kreas tion. Ĉiu lingva kontakto inkluzivas intergrupan kontakton, kaj el tio povas rezulti konflikto inter la majoritato kaj minoritataj komunumoj. Per prezento de empiriaj datumoj, mi iluminos minoritatajn lingvojn (precipe lingvopolitikon kaj lingvoplanadon) kiel eblajn sekundarajn kriteriojn pri la estiĝo de konflikto.

D-ino Ljubica Djordjević ~ Supera esploristo, Eŭropa Centro pri Minoritataj Temoj (ECMI)

La malintegriĝo de Jugoslavio iniciatis kaskadon de nacikonstruado en la novaj ŝtatoj, kie lingvo ofte grave rolis. Ĉi tio influis la leĝan (konstitucian) postulon pri la oficiala (ŝtata) lingvo, kaj ankaŭ foje ekscitis konfliktojn pri la statuso de lingvoj (aŭ tiel-nomataj lingvoj), kiuj iam estis konsiderataj unueca lingvo. La plej randaj kazoj estas Bosnio kaj Hercegovino (kiu havas tri oficialajn lingvojn devenantajn de la serbokroata) kaj Montenegro (kie la montenegra kaj la serba konsistigas lingvan dupoluson). Aldone, la leĝa statuso de postserbokroataj lingvoj en Kroatoj kaj Serbuoj montras interesan dinamikon en la protektado de minoritataj lingvoj inter “komunikado” unuflanke kaj “rekono” aliflanke.

D-ino Irmgarda Kasinskaite-Buddeberg ~ Konsilanto, Komunikado kaj Informa Sektoro, Unesko

La internacia jardeko pri Indiĝenaj Lingvoj (IDIL2022-2032), proklamita de la rezolucio de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj A/RES/74/135 estas unu el la ĉefaj rezultoj de la jaroj de indiĝenaj lingvoj

2019 (IYIL2019), kiun gvidis UNESKO nome de Unuiĝintaj Nacioj. La internacia jardeko prezentas la unikan eblon pliriĉigi la mondan lingvan diversecon kaj evoluigi multlingvecon per aktivigo de koncernatoj, kiuj agu politike kaj per siaj rimedoj por subteni indiĝenajn lingvojn tutmonde.

D-ro Michele Gazzola ~ Docento pri publika politiko kaj administrado, Fako pri Aplikataj Sociaj kaj Politikaj Sciencoj ĉe la Universitato de Ulstero

D-ro Mark Fettes ~ Asociita profesoro, Fakultato pri Edukado, Universitato Simon Fraser

Lingva politiko povas kaŭzi signifajn distribuajn efikojn inter diversaj homgrupoj (difinitaj laŭ ilia lingva repertuaro), kaj tial ĝi povas influi la bonfarton de individuoj loĝantaj en specifa lando aŭ regiono. Oficiala lingvopolitiko povas efektive influi la funkciojn kaj la uzadon de lingvoj en la socio, tiel reduktante aŭ pliiĝante malegalecojn inter parolantoj laŭ tio, kion ili povas fari kaj esti en tiuj lingvoj. Tiaj malegalecoj povas esti ebla fonto de konflikto. Indico de lingva justeco devus ebligi taksadon de tiaj distribuaj efikoj tra tempo kaj spaco, kaj monitori ilian disvolviĝon, kaj agi por kontroli ilin.